# NOVAĴLETERO

Nr. 20
Juni 1985

**Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista**
**Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep**

**Ver. Uitg.: R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge**

**Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85**
**van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.**
**Steunende leden: 500 fr.**

## Financaj rezultoj de la Markola Kongreso

Kvankam unu grava fakturo ankoraŭ mankas, tamen jam eblas doni superrigardon de en- kej elspezoj. La ciferoj ne estas akurataj, ĉar la librotenado ne estis sufiĉe detala, precipe ne dum la kongreso. Pro tio mi rondigas la ciferoj al miloj.

Je la enspeza flanko estas la kotizoj: 78.000 fr. por 92 aliĝintoj, tio estas meze 850 fr. je persono. Ne ĉiuj pagis la plenan kotizon (ekz. tiuj kiuj ne partoprenis la ekskursojn) kaj kelkaj aliĝis senpage pro speciala deĵoro dum la kongreso.

Je la elspeza flanko unue venas la kostoj por kopiado kaj sendado. Ili estis kune notataj en la librotenado, sed verŝajne la poŝtmarkoj plej gravas. Unu A4 kopio kostis meze 1 fr.

Poste venas la vendreda vespermanĝo (14.000 fr.) Favore al nia kaso estis ke duono de la ĉeestantoj ne uzis sia n duan trinkaĵkuponon.

La grupa aliĝo al "Amikoj de la Urbaj Muzeoj" kostis 13.000 fr. La insignoj kostis 8.000 fr., sed estas sufiĉa kvanto por minimume unu plia kongreso. 2.000 fr. ni uzis por diversaj etaj elspezoj, i.a. por donaco al la muzeo-gvidantinoj.

Asekuron (kiun ni ne bezonis) kostis 3.000 fr. por tri tagoj. Mi konsilas al venontaj organizantoj unue bone legi la kondiĉojn. Mi prenis plian tagon por ke la preparaj laboroj estu ankaŭ kovrataj, kaj nur poste konstatis ke tiaj laboroj estas aŭtomate kovrataj.

Ankoraŭ restas 23.000 fr., el kiuj ni devas pagi la aŭtobusan ekskurson (13.000 ĝis 15.000 fr.) Post tio la restaĵo servu duone al garantia fonduso por venontaj Markolaj Kongresoj kaj duone al iu speciala aranĝo de BGE por la movado.

## Jarlibro de la Bruĝaj Muzeoj

La partoprenintoj al la Markola Kongreso kiuj ankaŭ aliĝis al asocio "Amikoj de la Urbaj Muzeoj", povas aĉeti la Muzean Jarlibron je speciala prezo de 600 fr. (+ sendkostoj). Belgaj membroj de la asocio jam ricevis informojn pri tio. Por belgaj kaj eksterlandaj aĉetemuloj ni pretas peri kaj, por eviti sendkostojn, transdoni la libron okaze de iu E-aranĝo.

La rabatita prezo por la unua jarlibro (1982) estas 500 fr.



## Meditado post Markola Kongreso

Aperis pluraj artikoloj en la regiona gazetaro pri nia Markola Kongreso. La demando nun estas: kio estos la influo al la loĝantaro kiu pro tio (re-) informiĝis pri Esperanto ?

Mi timas ke la efiko estos pli negativa ol pozitiva. Plurfoje aŭdiĝis la demando ĉu sinjoro X aŭ Y ĉeestas. Ni devis, bedaŭrinde, respondi ke ne, ĉar li estas membro de alia samurba E-grupo, kiu malgraŭ la fruaj informoj amase malĉeestis.

Kion pensu la ne-esperantistoj pri tio. Ni ĉie fanfaronas pri niaj pac-idealoj, kaj aliflanke, en nia propra urbo, ni ne nur ne sukcesas kunlabori, sed eĉ ne volas veni al alies aranĝo.

Ne gravas ke tiel ni ridindigas nin mem, sed tre gravas ke ni ridindigas la Esperanto-movadon. Ciuj niaj laboroj, agadoj, elspezoj pro tio tute ne plu utilas al Esperanto.

Por mi estas klare: en provinca urbo estu nur unu Esperanto-grupo. Se la nun ekzistantaj grupoj ne sukcesas kunlabori, unu devas ĉesi la aktivecon, aŭ limigi sin al intern-movada aktiveco.

Duono de nia membraro loĝas ekster nia regiono. Cu ne estus preferinde ke tiuj membroj aliĝu al grupo en sia regiono ? Ĉiukaze, mi dum la pasintaj jaroj faris mian eblon kaj ne sukcesis. Mi vidas taskojn por mi ekster la loka kaj nacia movado. Alivorte: mi eksiĝos kiel prezidanto kaj ne interesiĝas pri funkcio en bruĝa nek flandra movado.

Bonvolu dum la ferioj bone pripensi la situacion por ke ni en aŭgusto aŭ septembro povi preni taŭgajn decidojn, favore al Esperanto.

RR

## 20a Markola Kongreso, Folkestone

La venontjara Markola Kongreso okazos de la 18a ĝis la 20a de aprilo en Folkestone.

Loĝado mendebla rekte de Southcliff Hotel, 25 The Lees, Folkestone CT20 2DY (tel. 0303-56075). La hotelo situas sur la klifo fronte al la maro, 1500 m. okcidente de la haveno. Prezo: GBP 46,00 por du tagoj, ekde vespermanĝo vendrede, por vespermanĝo, lito, matenmanĝo kaj bufeda lunĉo, inkluzive AVI.

Antaŭpago por loĝado: GBP 10,00 (Ten English Pounds) al Southcliff Hotel (Folkestone) Ltd per ĉeko (Eurocheque). Uzantoj de postĝirkonto trovos instrukciojn en la BCH-broŝuro (p. 36, 9.1.3).

Bonvolu mencii specialajn bezonojn kun la antaŭmendo. Estas konsilinde ke oni frue mendu unupersonan ĉambron. Aliaj informoj aperos poste. Bonvolu skribi pri ĉio rilate al la hotelo rekte al la hotelo. Pri ĉiuj aliaj aferoj bv. peti informojn de: Frances Randall, 5 Wiltie Gardens, Folkestone CT19 5AX (0303-54550).

## Renkontiĝo The Friars, Aylesford (1985.09.27-29)

Kotizo proksimume GBP 25,00. Antaŭpago GBP 2,00 al Mollie Buckle, 53 South Street, Barming, Kent ME16 9EX (tel. 0622-26548), menciante tipon de loĝado.

Vojaĝo: trajno de Dover kaj Folkestone; ŝanĝu en Ashford; buso (155) de Maidstone East kaj Bus Station al The Friars.